



NORMANDA ESPERANTO BULTENO

N° 288

Dépôt à la Bibliothèque Nationale, au Fonds Normand de la Médiathèque de Caen, aux Archives du Calvados et à la Bibliothèque de Cherbourg.

februaro 2024

Redaktas :
Korektas Dominik Cornice

Enpaĝigas : Michèle Langeois

Abono-kotizo : 10 €. « Espéranto – Normandie ». C. C. P. 283.40 H Rouen

Kasistino : Sylvie Caron, 44 rue Gustave Lennier. 76600 Le Havre



40 jaroj! Bela aĝo, ĉu ne? Koncerne la homajn estaĵojn, kvardekjaraĝulo komencas sian duan vivduonon laŭdire. Koncerne la asociojn, mi ne scias ĉu validas tia onidiro!

Ne sciante la estontecon, oni tamen rajtas konsideri la pasintajn 40 jarojn de **Hérouville-Espéranto** kiel feliĉajn kaj agadplenajn jarojn. En tiu ĉi bulteno troviĝas la historio de la asocio kaj atestoj de samideanoj kiuj, antaŭ pli malpli malproksimaj jaroj, travivis ion agrablan, interesan aŭ memorindan, ĉu kiam ili restadis ĉe ni, ĉu kiam ni, Heruvilanoj, vizitis ilin en iliaj landoj, urboj, domoj.

Vi malkovros, ke post la forpaso de ĝia kreinto, **Yves Nicolas**, la asocio ne pereis. Male! Por festi tiun datrevenon, energia skipo ellaboris allogan programon kies detalojn vi trovos ene de la bulteno.

Necesas ankaŭ precizigi, ke post 25 jaroj de la unua prezidanto, Yves Nicolas, post 15 jaroj la dua, **Gérard Sénécal**, transdonis la torĉon al **Bertrand Verstraete**, elektita en januaro. Dank'al tre motivita skipo, mi ne dubas, ke la asocio serene rajtas celi sian 50-an datrevenon en 2034!

Koncerne la **normandan asocion** kies prezidantino, **Véronique Girard** translokiĝis, la normandanoj devas nepre trovi posteulon aŭ posteulinon kaj taŭgajn rimedojn por daŭrigi ĝian vivon. Dum la venonta **Ĝenerala Asembleo kiu okazos la 22-an de marto** en la biblioteko de Hérouville-Saint-Clair, ni kune provos serĉi taŭgan solvon.

Bonan legadon!

Gérard Sénécal (eks-prezidanto de la klubo Hérouville-Espéranto)



Merci à la ville
d' Hérouville-
Saint-Clair
pour son aide.

Dankon al la urbo
Hérouville-Saint-Clair
pro ĝia helpo.

Enhavo

- P.1.2. 1984- 2024 Un peu d' histoire.
P.3.4 L' association Hérouville-Espéranto dans sa ville.
P.5.6.7.8.9.10 Mi memoras : souvenirs et témoignages.
P.11 Assemblée générale de l' association normande le 22 mars
Programo de nia datrevena jaro.
La tri prezidantoj.
P.12 Stage Espéranto des 23 et 24 mars, animé par Renée Triolle et Françoise Noireau.

HÉROUVILLE-ESPÉRANTO 1984-2024

40 ans en quelques dates

Octobre 1984 Tenue d' un stand d'information à la fête des associations. Depuis Hérouville-Espéranto a toujours été présente à ce grand rendez-vous.

7 novembre 1984 1er cours à la maison des jeunes

1986 . Journal officiel du 20 janvier, **Hérouville-Espéranto** devient Association Loi 1901

Yves Nicolas est le 1er Président.

1990 Première conférence publique. Povilas Jegorovas, avocat, était venu nous parler de la situation de son pays la Lituanie, alors en phase d' indépendance.



Devant le Phénix,
Yves Nicolas
(2ème en partant de
la gauche)
Mikaël Bronstein
(3ème en partant de
la droite) et Freddy,
Jean, Henri et Patrick
d' Hérouville-
Espéranto.

1991

Mickaël Bronstein, espérantiste de Tikhvine, vient en train avec sa famille. C'est la 1 ère visite privée d'un habitant de **Tikhvine**, récemment jumelée avec Hérouville Saint Clair.

1992 Accueil de 11 espérantistes d' Hérouville-Saint-Clair à Tikhvine.

1993

Accueil du 48 ème congrès national de SAT- Amikaro.

220 participants venus de 9 pays en collaboration avec de nombreuses structures Hérouvillaises.



1995 Salon international de peinture de Beauregard. Hérouville Espéranto joue un grand rôle dans l' invitation et l' interprétariat du pays invité : la Chine

1999 Débat au Mémorial de Caen « quelles langues pour Europe ? » Animé par Claude Flagegel, linguiste, Professeur au Collège de France et Brian Moon de Académie d' Espéranto.

2011

Après les tremblements de terre, le tsunami et la catastrophe nucléaire, témoignage de l'espérantiste japonaise Keiko Sanpai à la mairie d'Hérouville Saint Clair.



2010

Journée russe

Film "les petites vieilles " au Café des Images, repas russe et concert de 3 amis espérantistes de Tikhvine : Inga, Mikaël et Véra.

2014 Hérouville-Espéranto a 30 ANS

20 Septembre A.G Normandio Espéranto
Inauguration du square de l'Espéranto en présence des amis de Tikhvine, de Renée Triolle, déléguée auprès de l'UNESCO du mouvement espérantiste. Du 7 au 27 octobre exposition à la bibliothèque, le 17 projection et débat autour du film « qu'est-ce que l'Espéranto ? » 18 et 19 octobre stage régional avec le slovaque Stano Marček et le français Michel Dechy à la maison des associations.

SQUARE DE L'ESPÉRANTO

LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO ESTIS KREITA DE DOKTORO ZAMENHOF, LA PROJEKTO ESTIS PUBLIGITA EN 1887.

LA LANGUE INTERNATIONALE ESPÉRANTO A ÉTÉ CRÉÉE PAR LE DOCTEUR ZAMENHOF, LE PROJET A ÉTÉ PUBLIÉ EN 1887.



Octobre 2022

Décès de notre ami Yves Nicolas
Espérantiste, jardinier, apiculteur
Janvier 2023

Concert à sa mémoire au Café des Arts de Armel Amiot et de ses musiciens.

2018

Concert : La Kompanoj chante Brel au Café des Arts.



Octobre 2021
Parution de la brochure en espéranto, Caen-Hérouville Saint-Clair





Kalkuli per abakoj



En lernejoj en 1993 kaj en 2010



Kadre de la **Normanda Asocio**,
Hérouville-Espéranto
organizis **Turismajn Tagojn**
1 **Hérouville-Saint-Clair-Caen**, la
14an de oktobro 2017
2 **Falaise**, la 3 an de oktobro 2020
3 **Dives sur Mer**, la 17 an de junio
2023





Rusio 2011

Des voyages collectifs et des rencontres de clubs.

1992 Tikhvine
1996 Hongrie et Angleterre
1999 Tikhvine
2001 République Tchèque
2005 Tikhvine
2008 Japon
2009 et 2010 République Tchèque
2011 Russie
2013 Roumanie
2016 Russie
2023 Parme, Italie



Japanio 2008



Parmo 2023

Kolektivaj vojaĝoj
Festoj de la asocioj
Poliglotaĵoj Kafejoj
Turismaj tagoj
Prelegoj kun aliaj asocioj
Intervenoj en lernejoj



Poliglota kafejo kaj festo de la asocioj






Ni memoras ... Ni memoras ... Komence de la jaro 1998, Yves Nicolas ricevis leteron de nekonata Japanino. Tiu ĉi virino klarigis, ke ŝia filino intencis partopreni en la UK en Monpeliero. Pro tio la 20-jaraĝa virino ĵus ekkomencis lerni la lingvon. Ŝi intencis profiti de sia vojaĝo por turismumi en Francio, antaŭ la kongreso kaj, se eblus ankaŭ poste. Tiucele ŝia patrino serĉis por ŝi klubojn kiuj konsentus gastigi ŝin. Tiam Yves demandis la klubanojn. Kvankam ankoraŭ tute ne certaj pri nia kapablecoj bone paroli esperanton, ni tamen konsentis gastigi nian unuan esperantistinon.

Saĉi Owada, el la urbo Tokai-Mura, kune kun ni kaj aliaj klubanoj ĝuis la artfajraĵon de la 14-

a de julio, la tagon mem de sia alveno en Caen. Ŝi restadis ĉe ni nur tri tagojn sed revenis post la UK de la 15-a ĝis la 18-a, de la 20-a ĝis la 25-a kaj de la 28-a ĝis la 30-a de septembro.

Tiuj ege profitodonaj restadoj profunde restas en nia memoro. Ili estas je la origino de niaj longaj amikaj rilatoj kun dekoj da Japanoj, ĉu en Japanio, ĉu en Francio, aŭ aliloke en Eŭropo.

Gigi kaj Gérard (14)



Karaj,

la amikaj ligoj inter Esperanto-klubo de Tihvin kaj la asocio Herouville-Esperanto, kiuj startis en 1991, dum la pasintaj jardekoj transformiĝis en vere fratecajn.

Ni kun sincera danko rememoras la kortuŝe varmajn akceptojn de tihvinaj esperantistoj en nia ĝemelurbo Herouville St Clair, ankaŭ la plezuron akcepti vin en Tihvin – la reciproka vizitado kaj la komunaj aranĝoj servis por firmigi nian amikecon kaj, evidente, montris la senduban utilon de la lingvo Esperanto, uzata por nia interkompreniĝo.

Ni sendas al vi niajn sincerajn gratulojn okaze de la 40-jara jubileo de la asocio Herouville-Esperanto. Bedaŭrinde, la eventoj mondskalaj en la lasta tempo draste limigis niajn senperajn kontaktojn, tamen ja la amikeco inter ni ne estas rompita, kaj ni deziras, ke ĝi vivu longe. En 2025 Tihvina Esperanto-klubo festos 50-jaran jubileon; espereble, al tiu tempo ni havos en la mondo alian situacion, kiu permesos vian venon por kuna festado.

Korajn bondezirojn por la tuta membraro de la asocio!

Beaŭŝaj Vera
Vasiliy B...
Mikaelo J...
Viktoro K...
Aleksandro

Olga
Inga
Ulray

Belov S...

Esperanto-klubo de Tihvin (Rusio)

Le 48ème Congrès de Sat Amikaro à Hérouville en 1993.

L'idée d'organiser un congrès de Sat à Hérouville trottait dans la tête de Yves depuis longtemps déjà. A partir du moment où Hérouville Espéranto l'a adoptée, l'énergie et l'activité du club ont été orientées vers cet objectif. Le congrès aura lieu du 9 au 13 avril 1993, comme l'atteste une « flamme » commandée tout exprès à la poste : depuis le mois de janvier, toute lettre partant d'Hérouville annonçait, sur l'enveloppe, l'événement et ses dates.



La tâche était redoutable, en ampleur et en complexité. Mais tout le monde s'y est mis !

Il fallait assurer l'information et la communication, avec les réseaux de l'époque, prévoir et engager les intervenants, retenir les infrastructures à Hérouville : théâtre, cinéma, salles polyvalentes..., contacter la Mairie et être constamment en relation avec son service de relations internationales, assurer l'hébergement et la restauration de quelques 220 personnes, prévoir différentes activités et sorties (par exemple, trouver des vélos en nombre suffisant pour les probables amateurs de balades à la mer ou le long du canal). Certaines tâches étaient plutôt inattendues, comme le fléchage dans toute la ville (Patrick se souvient de mémorables fous-rires entre Yves, Jean et lui, tellement c'était compliqué...).

Une préoccupation majeure pour Yves était que le congrès ne soit pas parachuté à Hérouville avec des congressistes vivant dans une bulle, mais qu'ils puissent faire connaissance avec la réalité locale, notamment avec les structures originales de cette « Ville nouvelle » : écoles alternatives, bibliothèque ouverte le dimanche, tissu associatif très riche. De fait, de nombreuses structures, contactées, ont pris à cœur d'apporter leur contribution active à ce congrès inhabituel. Les congressistes ont tous été reçus à la Mairie et accueillis par un grand discours du maire-adjoint, puis, par petits groupes et selon leur choix, au Collège-Lycée Expérimental, à l'école Freinet ; mais aussi, entretien avec les services de l'habitat, rencontres avec des clubs sportifs, visite d'entreprises normandes...

Et, en ce début avril 1993, des esperantistes de toute l'Europe ont commencé à converger

vers Hérouville Saint-Clair. Je me souviens particulièrement des Russes, qui logeaient dans notre quartier, et de leur arrivée spectaculaire.

Quatre garçons dans le vent armés d'une guitare, Mikhaïl, Sacha K., Sacha, Vassili, tous les quatre dans une Lada bourrée à bloc et qui avait traversé toute l'Europe, venant de la ville russe jumelée depuis deux ans avec Hérouville, Tikhvine, non loin de St Petersburg. Bien d'autres aussi, certains avec des enfants. Pour les habitants, étonnement constamment renouvelé de voir toutes ces nationalités communiquer si facilement entre elles.

Le congrès a duré cinq jours. L'effervescence dans la ville et à la maison était telle que cela a passé très vite. Dans ma mémoire - et je crois que je ne suis pas la seule - ce congrès de Sat Amikaro de 1993 reste comme un moment exceptionnel d'échanges, de dialogue, de bonne humeur, de liens noués ou renforcés.

Neforgesebla!

Anne-Marie, femme de Yves Nicolas, janvier 2024



Sacha Kogan, Yves Nicolas, Mikaël Bronjstein

Mi bone memoras la monaton de majo 2012, kiam mia samideano Jean Pierre Sauvage invitis min kun mia amikino Tania en Caen. Kiam ni alvenis en Francion, Jean-Pierre partoprenis en la esperanta koruso en la kastelo de Greziljono.



Olga kaj Tania

Ni do renkontiĝis ĉe Claudie kaj Dominique Bureau, esperantistoj, kiuj tre afable gastigis nin proksime de Greziljono dum Jean-Pierre kantis. Dank'al tiu paro ni vizitis ravigan Anĵeron kaj ĝiajn muzeojn dum la fama nokto de muzeoj, farmobienon de lakto kaj aliajn interesajn lokojn ĉirkaŭ Anĵero.

Laŭvoje ĝis Caen ni ankaŭ ekvidis, admirindan monaĥejon de Mont-Saint-Michel. Mirinda vojaĝo!

En Caen nin atendis gastiganta domo de Jean-Pierre, kaj du tagojn poste, surprizo en lia ĝardeno: neatendita kaj varma renkontiĝo kun preskaŭ ĉiuj anoj de la esperanta asocio de Hérouville st Clair. Tio estis neforgesebla amika vespero kun esperantaj, rusaj, francaj kantoj, kaj gaja franca vespermanĝo, akompanata per vodko kaj vera rusa borso... Verŝajne, tiu borso tiel bone fortigis nian amikecon, ke ĝis nun, eĉ en tiu komplika tempo, mi regule ricevas bultenon de via bonega asocio, kaj ĉiufoje, kiam mi vizitas Caen, mi kun granda plezuro partoprenas al viaj kunvenoj.

Bonan 40-jaran Jubileon kaj prosperon al via Asocio, miaj geamikoj! Korbrakumojn al ĉiuj.

Via Olga Beljaeva el Rusio.

Mi memoras... Vendredon, la 8-an de januaro 2010, nia esperanta klubo kun la loka asocio Solidareco Tiĥvin organizis rusan vesperon (Tiĥvin estas ĝemelurbo de Herouville).

Post longa preparado, mi kaj rusaj respondeculinoj interkonsentis pri interesa programo. Je la 19-a, ni proponis rusan vespermanĝon fare de Éric, Céline kaj ilia skipo, en la kafeterio de la kinejo "Café des Images".

Sekvis filmo « Maljunulinoj » (Les petites vieilles) de Guennadi Sidorov) en la kinejo super la restoracio. Reveninte en la kafeterion ĉirkaŭ la 23-a, regalis la ĉeestantaron la triopo de tiĥvinaj gekantistoj, la fame konata verkisto-kantisto-komponisto **Mikaelo Bronŝtejn**, la profesorino de la muzika konservatorio **Vera Vlasova** kaj ŝia nevino **Inga**. Dum pli ol unu horo ili interpretis konatajn kaj malpli konatajn kantojn de la esperanta repertuaro sed ankaŭ kelkajn el la tradicia rusa folkloro. La sukceso de tiu eksterordinara vespero estis tiel granda, ke ni bedaŭrinde rifuzis aliĝilojn por la vespermanĝo.

Tamen partoprenis en ĝi kaj la koncerto pli malpli cent homoj!



Gérard(14)

Kara Gerard, mi memoras, ke vi akompanis min al la nuklea centralo Hague. Jam du reaktoroj estis konstruitaj kaj oni estis konstruanta la trian reaktoron. Ĉu vi jam havas la trian ? Iu loĝanto diris al mi, ke li evitas pensi pri ebla danĝero de la nukleaj reaktoroj.

Kara Gerard, mi memoras, ke vi akompanis min al la marbordo de Normandio, kie okazis la surlandiĝa operaco. Gigi diris, ke ĝia urbeto kaj la domoj estis detruitaj dum la batalo, sed ŝi estis feliĉa pro la venko de la Alianculoj.

HORI Jasuo (Japanio)



Revenis al mi rememoraĵoj pri **Klod** en nia esperanta pensiono Espero en vilaĝeto Skokovy. La domo plu ne ekzistas ... kun Klod en Prago en juda kvartalo... kun manĝado de "kneliky" ... pri lia babilado kun mia kara patrino nescianta eĉ unu esperantan vorton, pri kiu Klod diris ke ŝi havas "verdajn manojn" ... Eĉ nun mi bedaŭras, ke mi ne foriris kun li al Aŭstralio instrui la lingvon, kiel li proponis ... Li ĉiam bele ĝentile uzis kelkajn ĉehajn vortojn ...

Vivu plu en Zamenhofa etoso, ideo de homaranismo!

Jindřiška Drahotová, Ĉeĥa Respubliko, decembro 2023.






Mi tre bone memoras mian viziton al la asocio Herouville Esperanto. Ĝi okazis en 2012.

Kutime mi vizitas Eŭropon en julio kaj aŭgusto, sed ĉi tiun jaron mi devis atendi ĝis oktobro antaŭ ol reheimiĝi al Aŭstralio por ĉeesti la geedziĝon de mia filo. Enkondukis min mia gastiganto Claude Ferrand. Mi prelegis pri la historio de la radio stacio 3ZZZ, kiu akceptas nin inter la 60 aliaj grupoj, ĉar tiu historio respegulas la evoluon de la politiko de rapida asimiliĝo de la enmigrintoj al la angla-saksa kulturo, tiu de la unuaj setlantoj, al pli fleksebla sinteno pro rekono de la multkulturreco en la lando. Krom malkovro de la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj sub la gvidado de la lokaj esperantistoj, mi gustumis la lokajn

gastronomiaĵojn en gaja etoso. Mi deziras al la asocio kaj asocianoj longan viglan vivon.

Franciska Toubale (Aŭstralio)



Septembro 2019. Tiun vesperon, puŝante la pordojn de la Domo de la asocioj, mi ankoraŭ ne sciis...

La asocio Dérailleurs, kiu kunvenigas la biciklantojn de Caen, disdonis informon kiu kaptis mian atenton : "Claude Rouget, franca biciklo-vojaĝanto el Norvegio, survoje al Portugalio, trapasas Caen kaj ĉiuj estas invititaj renkonti lin okaze de prelego, aranĝita en Hérouville-Saint-Clair."

- "Nenio pli bone por fari. Ni iru tien!", diris Veronik'.

Mi jesis.

Post la prelego, Ivo invitis min partopreni en la kurso por komencantoj kaj sindoneme intruis min. Dum la kronvirusa periodo, li tamen daŭrigis per virtualaj rimedoj. Li tiel transdonis al mi la ŝlosilojn de tiu trezoro: la frata mondo de Esperanto.

Estu li dankata!

Ankaŭ partoprenis tiun aranĝon l'amiko Zef, la nekredebla biciklanto. Mi ĉiam memoros tion, kion li diris al mi : oni devas klopodi prizorgi ambaŭ sian korpon, biciklante, kaj sian menson esperantistiĝante.

Li tute pravas !

Tial mi fariĝis esperantista biciklanto.

Tial mi fariĝis biciklanta esperantisto.

Bertrand(14)



HEROUVILLE - ESPÉRANTO

De Tromsø en Norvège au Portugal en passant par Caen, àVÉLO !



Né Français **Claude ROUGET** a enseigné dans le Calvados avant de partir, dans les années 80, vivre en Norvège et devenir citoyen norvégien.

Avec sa compagne russe et leur fille, une langue commune : l'Espéranto.

Cet espérantiste passionné de vélo transporte dans ses sacoches beaucoup d'expériences qu'il partagera volontiers durant la rencontre publique organisée par le club Hérouville-Espéranto le

MARDI 10 SEPTEMBRE 2019 à 18h30

À la Maison des associations d'Hérouville-Saint-Clair

1018 Boulevard du Grand Parc

Soirée publique et gratuite.

Informations : herouville-esperanto@stc.fr

06 44 87 22 48





Grésillon, Maison culturelle de l'Espéranto

12 - 21 avril 2024

12e **PRINTEMPS** cours intensifs et examens avec Marion Quenut, KÓRÓDY Zsófia, Paweł Fischer-Kotowski, Duncan Charters.

Bonvolu akcepti miajn bondezirojn okaze de la 40-a jubileo de Herouville Esperanto klubo. Ĝojaj renkontiĝoj, belegaj vidindaĵoj, riĉnaturaj pejzaĝoj k.t.p. ĉiuj estas neforgeseblaj memoroj por mi dum miaj tri vizitoj (2006, 2011, 2015). La plej valora afero estas nia amikeco inter ni dum 19 jaroj, ekde kiam ni unuafoje renkontiĝis en 2005, ĉe mia urbo Yokohama.

Elkore salutas **Akemi Ookawa** (el Japanio)

Alveno en Normandion

En 2013, Rodica Todor rumana esperantistino organizis vojaĝon al ŝia lando.

Do, ŝi petadis francajn kaj belgajn klubojn por kunvenigi gepartoprenantojn.

La vojaĝo interalie entenis krozadon sur delto de Danubo.

Ni admiris la diversajn grandajn birdojn kiuj nestis, nome kormoranoj, gruoj, blankaj pelikanoj, ardeoj, cignoj, eksterordinaraj momentoj.

Do, mi renkontis Claude kaj aliajn anojn de la klubo de Hérouville.

Ni intersanĝis niajn adresojn...

En 2014, por la 30 jaroj de sia klubo, Claude invitis min kaj mi venis unu semajnon kun miaj du nepinoj, Nicole Jehenne gastigis nin ĉe bordo de la maro, ni vizitis Caen, la plaĝojn de la elŝipiĝo, k.t.p.

Belegaj memoroj de tiu Normandio nekonata por mi tiam.

Post pluraj interŝanĝoj per leteroj, aŭ komputilo, nia simpatio transformiĝis, ni decidis kune vivi, do mi elektis loĝi en Francio.

Ni estas en 2024, kaj mi tie restas nun.

Francio estas mirinda kaj Claude ŝategas malkovrigi ĝin al mi.

Mi, kiu vivis sola dum 27 jaroj post mia eksedziĝo kaj kiu tute ne pensis rekonstrui paron je 65 jaroj.

Marie-Anne (14)

Memoro pri Japanio.

En 2008, dum mia vojaĝo al Japanio atendis min bela surprizo.

Yuriko mia gastiganto kun tri amikinoj vestis min per pluraj kimonoj.

Mi malkovris ĉiun paŝon de ĉi tiu tradicia vestaĵo.

Poste mia gastiganto donacis al mi unu el ĉi tiuj kimonoj. Kia mirinda memoro.

Brigitte (14)

Hérouville Espéranto à l'heure japonaise



Les quatre Japonaises espérantistes de Yokohama reçues à la mairie par Sylviane Lepoittevin et entourées de leurs hôtes de l'association Hérouville espéranto.

Après l'accueil récent d'une habitante de Sendai (Japon) qui a apporté son témoignage pendant et après le tremblement de terre et le tsunami qui ont touché sa ville et sa région, le club Hérouville Espéranto reçoit depuis le 29 avril quatre autres espérantistes japonaises de Yokohama. « Deux d'entre elles, Akemi et Kayoko, ont déjà visité la Normandie en 2006, indique Gérard Sénécal, président de l'association Hérouville Espéranto. Elles en ont gardé un excellent souvenir. Les deux autres, Akiiko et Yuriko, vivent en ce moment leur première expérience en terre normande. »

Samedi matin, sous la houlette de

Mariannick Lefranc, directrice du service éducation de la municipalité, les visiteuses ont reçu un accueil sympathique de Sylviane Lepoittevin, maire adjoint, en présence de M. Kamara, conseiller municipal et d'un petit groupe d'espérantistes locaux.

« Logées, nourries, accompagnées par leurs amis français, les Japonaises vont avoir pendant une semaine l'occasion de revoir ou découvrir, outre la ville d'Hérouville, Bayeux, Caen, le Mont-Saint-Michel, Saint-Malo, les cimetières militaires américains et allemands, Arromanches et les plages du Débarquement », conclut Gérard Sénécal.



Klod kaj Marcel el Belgio sur ŝipo

Je via sano!



Cher-e-s ami-e-s de l' Association Normande d' espéranto,

Comme vous le savez Hérrouville-Espéranto fête ses 40 ans cette année 2024;

l' occasion pour l' Association Normande de se réunir en **Assemblée Générale** pour décider de son avenir.

Le décès de notre ami Yves Nicolas, le départ de notre présidente Veronik Girard dans une autre région nous laissent désemparés.

Nous avons édité 3 bulletins depuis le décès de notre rédacteur-chef, en décembre 2022, mai et décembre 2023.

Nous avons organisé la journée touristique à Dives-sur-Mer en juin 2023.

Mais la situation est bancale.

Réunissons-nous pour décider ensemble de l' avenir de l' Association Normande.

Le vendredi 22 mars, 15h30 à la bibliothèque municipale de Hérrouville Saint Clair.

L' association peut-elle perdurer ? Si oui avec qui ?

Doit-elle se raccrocher à un club ? autres propositions bienvenues.

Vous pourrez ensuite si vous le désirez assister à **la conférence de Renée Triolle**, vous restaurer au café des Arts et participer le lendemain au stage d' espéranto à la Maison des Associations.

Merci d' informer de votre participation à

Michèle Langeois 06 74 48 96 61 ou michele.langeois@wanadoo.fr

La programo por nia datrevena jaro 2024

La 12-a de februaro: **malfermaj tagoj** ĉe MDA (Domo de la Asocioj)

Februaro: Speciala datrevena **Normanda Bulteno**. Ekspozicio pro Esperanto en la biblioteko.

La 22-an de marto: **Ĝenerala Asembleo** de la normanda asocio en la biblioteko.

22-a de marto je la 18a : Konferenco de Renée Triolle "Esperanto, ĉu danĝera lingvo?" en la biblioteko.

Komuna manĝo ĉe Café des Arts.

23-a kaj 24-a de marto: **staĝo**, kursoj kun Renée Triolle por komencantoj kaj kun Françoise Noireau por progresintoj.

Majo: Strasburga **kongreso**

Junio: **akcepto** de niaj Parmaj amikoj.

La 11-a, 12a kaj 13-a de oktobro: vizito al niaj amikoj de la **Esperanto-klubo en Troyes** kaj al vitejo en Ĉampanjo.

Oktobro: **plantado de arbo** en la Skvaro de Esperanto.



Estimata Yves Nicolas prezidas dum 25 jaroj, Gérard Sénécal dum 15 jaroj kaj la nova prezidanto elektita dum la Ĝ.A de la klubo?



Hérouville-Espéranto fête ses quarante printemps !

STAGE D'ESPÉRANTO, INITIATION ET PERFECTIONNEMENT.
animé par Renée Triolle et Françoise Noireau

Samedi 23 et dimanche 24 mars 2024

à la Maison des associations – M.D.A
10-18, Quartier du Grand Parc – 14200 Hérouville-Saint-Clair

Programme :

Le groupe initiation, animé par Renée Triolle, est destiné aux personnes n'ayant aucune connaissance de l'Espéranto ou n'en ayant qu'une pratique élémentaire.

Le travail proposé dans le groupe perfectionnement, animé par Françoise Noireau, est centré sur les pratiques orales.

Samedi 23 Mars

8h45 Accueil, ouverture du stage
9h35 Cours
10h 25 Pause
10h45 Cours
12h25 Repas partagé
13h55 Cours
15h35 Pause
15h55 Cours
16h45 Temps en commun

Dimanche 24 Mars

9h Cours
10h40 Pause
11h Cours
12h40 Temps en commun
13h Fin du stage – collation sur inscription

- Restauration : Pour éviter de perdre du temps en nous déplaçant dans un lieu extérieur pour le repas, nous vous proposons :

pour le repas du samedi midi, un repas partagé : Chacun amène un plat, salé ou sucré (pour 4) et une boisson, ses verres et ses couverts.

pour le repas du dimanche midi : une collation sur inscription (entrée, plat, dessert)

- Hébergement : Nous pourrions vous communiquer la liste des hébergements de proximité et, dans la mesure de nos disponibilités, accueillir les personnes venant de loin qui en feront la demande.

Contacts :

Christian Marlier-Riquier :

07 86 28 99 85

riquier2@gmail.com

Bertrand Verstraete :

06 09 42 10 06

bertrand.verstraete@tutanota.de



FICHE D'INSCRIPTION – remplir une fiche par personne – faire des photocopies au besoin.
Attention le nombre de places est limité et les inscriptions sont enregistrées par ordre de réception.

Nom :Prénom.....

Adresse :
.....

Courriel :@.....

Téléphone :

Je m'inscris au stage d'initiation. ☐

Je m'inscris au stage de perfectionnement. ☐

Participation aux frais, tarif normal :

☐ 20 €

Participation aux frais, tarif étudiant :

☐ 5 €

Je souhaite prendre la collation du dimanche midi.

☐ 10 €

Soit.....€.

Règlement par chèque établi à l'ordre d' «Hérouville-Espéranto», **avant le 1er mars**
à adresser à Christian Marlier-Riquier, 11, rue des Frères Colin – 14000 CAEN.